

Esperanto sub la Suda Kruco

Januaro-Februaro 1997
Numero 25 (vol. 5, n^o 1)
ISSN 1039-9380



Esperanto sub la Suda Kruco

Oficiala organo de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj
Numero 25 (volumo 5, numero 1), Januaro-Februaro 1997

Redaktoro: Donald Broadribb
59B Lukin St, Beverley WA 6304, Aŭstralio
Telefono: 096 46 1389
e-poŝto: Don <enkidu@perth.dialix.oz.au>

Libr oser vos: Tom Elliott, PO Box
230, Matraville NSW 2036,
Aŭstralio.

Korespondaj kursoj: D. Lukes
& H. Green, PO Box 1814,
Toowoomba Qld 4350.

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO, VERKU ARTIKOLON!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de *Esperanto sub la Suda Kruco*: "Ni vere bezonas artikolon pri...? Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakonton, esprimon de vidpunkto, leteron, desegnaĵon, foton. Vi povas sendi vian kontribuon sur komputila disko (Mac aŭ MS-DOS—nur 3.5"), tajpita sur papero, aŭ (prefere) per e-poŝto. Se vi sendas sur papero, la teksto devas esti klare tajpita per freŝa rubando, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Netajpitaĵmanuskriptojn ni ne akceptas.

La redaktoro rajtas redakti kaj korekti ĉiun tekston antaŭ aperigo, kaj konformigi ĝin al la stilo kaj kutimoj de ĉi tiu gazeto. Laŭ bezone teksto povas esti mallongigita. Ni ne povas promesi aperigon en la tuj sekvonta numero, krom se

temas pri io kronologie urĝa. Pri la enhavo de artikolo respondecas nur ĝia aŭtoro.

Adresoj kaj abonkotizoj sur p.27.
EN ĈI TIU NUMERO

Artikoloj:

Waitangi kaj Magna Carta (Fox)	3
Sengurue en Usono (Zaft).....	4
Skribas la legantoj	9
Esperantaj loknomoj (Golden) ..	10
Provu vortoscion (Broadribb).....	11
Deziras korespondi.....	12
Diversaĵoj.....	13
Krom kaj malkrom (Leereveld) ..	15
Lingva Angulo (Towsey)	17
Lernejfesto en Kvinslando	19
Nekrologoj: Zeng Hoyaŭ.....	20
Bill Graham.....	21
Eileen Olsen	21
Reduobligado (Harry).....	22
Respondoj por "Provu vian vortoscion:.....	25

Recenzoj

<i>Politika hegemonio kaj lingva hegemonio en Eŭropo.....</i>	8
<i>La ŝapo de la sterbo-verma.....</i>	8

ENGLISH SUPPLEMENT



La venonta renkontiĝo kaj jar-kunsido de Nov-Zelanda Esperanto-Asocio okazos ĉirkaŭ la Tago Waitangi en 1997 ĉe Masterton. Do estas oportune preparoli la Traktaton de Waitangi, kiu estas la baza dokumento de moderna Nov-Zelando.

Oni ofte komparas la Traktaton de Waitangi kun la Magna Carta de Anglio. Unu diferenco estas ke la nobeloj de Anglio kaptis Reĝon Johanon, kaj devigis lin subskribi la deklaron kontraŭ lia volo, sed la Traktato de Waitangi rezultis de egala traktado inter la Britoj kaj la Maoriaj ĉefoj.

Malgraŭ tio, ekzistas multaj similaĵoj en du dokumentoj. Ekzemple, Reĝo Johano antaŭ 1215 ŝtelis bienojn de iuj el la Kimraj nobeloj. La Magna Carta deklaris: "Se ni forprenis bienojn de Kimroj sen la leĝa juĝado de iliaj egaluloj, ni tuj redonos la bienojn."

En la Traktato de Waitangi oni deklaris: "La Reĝino de Anglio garantias al la triboj de Nov-Zelando la tutan senesceptan kaj senĝenan posedon de iliaj terenoj kaj bienoj, arbaroj, fiŝejoj, kaj aliaj posedaĵoj."

Ĉiu nun scias ke la registaroj

de Britio kaj Nov-Zelando ofte rompis tiun garantion, same kiel la reĝoj de Anglio ofte rompis la garantiojn en la Magna Carta. En Anglio dum la Militoj de la Rozoj, ĉiu venkinta reĝo forprenis la bienojn de la kontraŭaj nobeloj. Post tiuj militoj Reĝo Henriko Oka forprenis bienojn de la eklezio.

En Britio dum jarcentoj ekzistis sistemo de Aperta Farmado, kie malriĉaj kamparanoj rajtis kultivi legomojn kaj paŝti siajn bestojn en Komunejoj. Sed iom post iom la grandaj terposedantoj "enfermis" tiujn Komunejojn en siajn proprajn grandajn bienojn, kaj multaj kamparanoj mortis pro malsato. Aliaj migris al urboj kaj kolonioj.

Dum la 1830-aj jaroj Britio kaj la Brita registaro komencis pli liberalan epokon. En 1832 Parlamento leĝdonis la Reforman Akton kiu agnoskis homajn rajtojn. En 1834 ĝi aboliciis la sklavan sistemon en la Brita Imperio. En 1839 oni sendis Kapitanon Hobson al Nov-Zelando por trakti kun la Maorioj, precipe por ekskluzivi la Francojn.

Li alvenis en 1840 kaj oni aranĝis kunsidon por 5 februaro, kie la Maorioj postulis ŝanĝojn al la malneta traktato kaj Hobson konsentis ke misiisto Williams faru novan tekston. Ne ekzistis sufiĉa manĝaĵo por du pliaj tagoj, do oni devis rekunsidi en 6 februaro; kaj povra Williams devis traduki dum la tuta nokto en lingvon kiun li nur mezbone regis. Do li inventis kelkajn terminojn: "kawana-tanga" (el la vorto "gubernismo"), kaj uzis ĝin por traduki "suvereneco".

Poste li uzis "tino rangatira-

tanga" (tuta ĉefismo) por "tuta sen-escepta kaj senĝena posedo de...". Post granda debato la ĉefoj komencis subskribi la "Traktaton de Waitangi" en 6 februaro 1840, kaj tra la lando dum postaj monatoj.

Ja ekzistas diferencoj en la Angla kaj Maoria versioj de la traktato, sed la spirito de ambaŭ estas la sama. Kio multe pli gravas, estas ke post dudek jaroj la eksbritoj en Nov-Zelando tute ignoris la traktaton kaj komencis forpreni teron. Oni eĉ militis kontraŭ Maoriaj triboj por forpreni la teron, kaj tiam leĝe punis la Maoriojn pro ilia defendo de sia tero, per forpreno de ilia tero!

Tiu forpreno de Maoria tero daŭris ĝis antaŭ nelonge. Mi mem memoras kiam en 1950 la Nov-Zelanda registaro forbruligis la tutan Maorian vilaĝon ĉe Orakei en Aŭklando, kaj forprenis ĝian tutan terenon Bastion Point. Ĉiu Aŭklandano povas memori la kvardekjaran batalon por regajni tiun teron. Kaj la malliberigon de iuj Bastion-Point-protestantoj.

La malfeliĉiga afero estas ke ankoraŭ ekzistas multaj Nov-Zelandoj kiuj kredas ke "la Maorioj volas gajni ĉion por si", kiam ili nur deziras la agnoskon de unu leĝo por ĉiuj ĉu laŭ la Magna Carta, ĉu laŭ la Traktato de Waitangi.

Dum la Enfermado de la Komun-ejoj en Anglio, la kamparanoj kantis poemon: "Oni malliberigas la malriĉulon kiu manĝas anseron de la komunejo / Sed lasas libera la riĉulon, kiu manĝas la komun-ejon de la ansero." §

SYLVAN ZAFT

SENGUR UE

EN

USONO

© 1997 Sylvan Zaft

En la granda lando Usono ekzistas ĉiaj religioj, de la enorma Romkatolika Eklezio kun siaj sesdek milionoj da anoj ĝis etetaj sektoj kun nur manplenoj da membroj. Inter tiuj ekzistas iu negranda Hindua sekto kies ĉefa centrejo konsistas el alloga kvaretaĝa ruĝ-brika konstruaĵo sur verda montflanko en la okcidenta parto de la ŝtato Massachusetts. Bienon kun tiu konstruaĵo aĉetis la sekvantoj de de-Bharata¹ Guruo antaŭ kvarono de jarcento. Origine, en la kvindekaj jaroj, la Jezuita ordeno estigis la konstruaĵon kiel monaĥejon.

Ho ve! En la jardekoj post la fino de la konstruado, la nombro da interesatoj pri la Romkatolika monaĥa vivo malkreskegis. La Jezuitoj devis vendi la monaĥejon kiu nun estis preskaŭ sen monaĥoj. Ili klopodis vendi ĝin al la ŝtato Massachusetts kiu deziris ŝanĝi ĝin en malliberejon. La grandaj ĵurnaloj de la ŝtato mokegis la planon. Malliberuloj ne meritas, laŭ la ĵurnal-

¹ Bharato = Hindio

la ŝtato Massachusetts kiu deziris ŝanĝi ĝin en malliberejon. La grandaj ĵurnaloj de la ŝtato mokegis la planon. Malliberuloj ne meritas, laŭ la ĵurnaloj, loĝi je tiu idilieca bieno kiu situas ĉe bela lago apud la somera hejmo de la Boston-Simfonia Orkestro. La mokado devigis la ŝtaton rezigni pri la aĝeto. Finfine la Jesuitoj komprenis ke nur iu stranga Hindua sekto proponas pagi por la bieno. Malbonvole la ordeno akceptis relative malmultan monon kaj tiel finance helpis la Gurumon kaj lian laboron.

La sekto allogis interesatojn kiuj pagis moderajn sumojn por dumtempe loĝi en etaj Ĝambroj kien oni origine intencis loĝigi kristanajn monaĥojn. En silento tiuj vizitantoj kunmanĝis en lumplena manĝoĜambrego. La manĝaĵo estis bongusta, sandona kaj tute vegetara. En la Centrejo oni studis kaj ekzercis sin je meditado. Oni ellernis la arton de terapia masaĝo. Masaĝon la viroj studis kaj faris en unu loko; la virinoj en alia loko. Oni jogadis. Oni lernis la arton efike ami. Oni strebis liberigi sin de malbonaj emoj. La ĝeinstruistoj estis ĝentilaj, helpemaj, sindonaj, kunsentemaj.

Kelkaj pagantaj gastoj loĝis en tiu Centrejo dum semajnoj aŭ eĉ monatoj, kaj aliaj dum nur kelkaj tagoj.

Kiam oni loĝis en la religia bieno, oni estis devigata tute ne amori.

Dum du-tri jaroj ĉe la Centrejo bona amikino mia volontis. Profe-

sie mia amikino estis meznivela direktoro de granda asekura firmao, sed kiam ŝi ekvolontis oni taskis ŝin purigi la tapiŝojn, la plankojn, la murojn. La laboro estis malfacila kaj malagraba sed ŝi diligente plenumis la taskon. Tamen, post kiam oni malkovris ke ŝi estas altnivela kontisto, oni petis ke ŝi helpu malfuŝi la kontistemon de la sekto. Tion laboron, pli agrablan por ŝi, ŝi bonvole faris.

Pro tio ke mia amikino estas valora volontulo, ŝi ne devis pagi por ĝuila servojn kiujn oni provizis.

La sekta estro, la Guruo, ne loĝis en la Centrejo mem sed en apuda domo kun la edzino kaj infanoj. La Guruo, alta, bela viro, havis longan nigran hararon, aglan nazon, brilan rideton, riĝan kaj plaĝan voĉon kaj serenajn mienon. Kiam la Guruo predikis, kiam li instruis, stabanoj kaj vizitantoj amasiĝis por lerni saĝecon. La aŭskultantoj sidis sur luksa rozkolora tapiŝo en la kapelo kaj atentis liajn vortojn. La Guruo predikis ke oni ne povas trovi la veran kaj daŭran feliĝon per amoraj rilatoj. Por atingi la veran feliĝon oni devas meditati, ami ĝiujn, helpi unu la alian ktp. ktp. Oni devas serĉi propran gurumon, amegitiun, kaj lerni ties lecionojn. Ameme la Guruo rakontis pri sia propra guruo, kaj grandajn bildojn de tiu serena kahulo oni vidis en multaj lokoj en la konstruaĵo. Oni nomis la Centrejon laŭ la nomo de la guruo de la Guruo.

Unu printempon mi aŭtomobilis

okcent mejlojn de mia apartamento en la ŝtato Michigan al Massachusetts kie loĝis mia amikino kaj kie situis la religia bieno. Mi estis meznivela instruisto kaj mi planis ferii dum la paska semajno kun mia amikino. Du tagojn ni loĝis en la Centrejo, kompreneble en apartaj ĉambroj. Ĉar mi estis ŝia gasto, loĝado kaj manĝaĵo estis por mi tute senkostaj.

En multaj lokoj oni povis lerni la lecionojn de la Guruo. Oni povis aĉeti belegajn malmultekostajn librojn kun bildoj de la Guruo. Oni povis aĉeti sonbendojn por aŭskulti la riĉan serenajn voĉon kaj lerni la belajn amigajn lecionojn. Oni povis kune sidi kaj rigardi vidbendojn kiuj montris la Guruon instruantan la veron.

Paskomatene mi kaj mia amikino kaj centoj da stabanoj kaj vizitantoj surtapiŝe sidis en la kapelo kaj aŭskultis la majstron. La Guruo parolis pri la diversaj religioj. Li tute ne instruis malamon al iu ajn alia religio. Li kuraĝigis la vizitantojn foriri el la kutima laborloko unu semajnon Ĝiujare por loĝi en la Centrejo kaj tie purigi korpon kaj animon.

Kiam oni demandis pri amoraj rilatoj li ŝultrolevis kaj diris ke oni Ĝiam povas strebi tiel atingi veran feliĉon. Sed, li demandis, Ĉu tiaj rilatoj vere ĝis nun helpis iun ajn longdaŭre feliĉigi? Por atingi veran longdaŭran feliĉon oni devas ne fidi amoron sed amon, meditado kaj bonan konduton.

Malfrue tiun tagon mi kaj mia

amikino forveturis. Kune ni ĝuis la belegajn montojn en la printempa sezono. Poste mi reiris hejmen kun kelkaj aĉetaĵoj. Inter tiuj aĉetaĵoj estis libroj kaj sonbendoj kun la bonaj instruoj de la Hinduo guruo. Liaj lecionoj, miaopinie, estis Ĝiujbonaj. Mine sekvis Ĝiujn liajn konsilojn sed Ĝiujn mi estimis.

Je unu tago, jarojn poste, mi eklegis mallongan ĵurnalan artikolon pri la Guruo kaj la Centrejo. Tiu artikolo ŝoketis min. Tuj mi telefonis al mia amikino por akiri pliajn detalojn.

La religiaj lecionoj de la Guruo, miaopinie, estis perfektaj. Bedaŭrinde ties propra konduto, kiel la konduto de preskaŭ Ĝiuj el ni, estis iugrade neperfekta. Kvankam li estis longtempa edzo, iu edzinigita virino, longtempa amikino, akuzis lin pri amorado kun ŝi. Obstine dum jaroj li malkonfesis. Kompreneble, la stabanoj kaj aliaj sektanoj plejparte kredis je la serena respektata Guruo kaj ne je la iom freneza virino kiun ili taksis mensmalsana. La geedzeco de la virino fiaskis kaj finiĝis. Ŝi konsultis psikoterapiston. Tiel obstine kiel la Guruo ŝi neniam Ĉesis akuzi lin. Tamen, finfine, post multaj jaroj, du aliaj virinoj faris similan akuzojn kaj la malkonfeso de la Guruo Ĉesis.

Tio kio por mi estis ŝoketo, por la dediĉitaj sektanoj estis ŝokego. La fundamento de ties vivo ŝanceliĝis.

ojn de la mensoginta Guruo?

Dumtempe oni ne plu akceptis gastojn. Specialaj konsilistoj helpis la stabanojn kaj aliajn sektanojn trakti la fortegajn negativajn emociojn kiujn instigis la malbonvenega novaĵo. Multaj stabanoj deprimiĝis. Multaj forlasis la Centrejon kaj la sekton. Aliaj laŭgrade akceptis la maldolĉan veron. Iom post iom tiuj lernis vivi senglure sed ne seninstruiste.

La Centrejon oni remalfervis por gastoj. Nuntempe, refoje oni vizitas la allogan kvaretaĝan rubrikon konstruaĵon. Oni jogadas, meditadas, lernas terapian masaĝon, lernas la lecionojn de amo. La Centrejo prosperas. Vizitantoj refreŝigas la korpon kaj animon kaj akiras saĝecon. Oni komprenas ke la lecionoj de la eks-Guruo estas plejparte saĝplenaj malgraŭ tio ke li mem estas adultinto kaj mensoginto.

Kelkaj reguloj ŝanĝiĝas. Nuntempe instruistoj plej ofte uzas siajn Usonajn nomojn anstataŭ Hindajn nomojn. En la lastaj jaroj multaj membroj kaj stabanoj geedziĝis.

Oni forvendis la tutan stokon de libroj, sonbendoj kaj videbendoj kun la bildoj kaj voĉo de la eks-Guruo kontraŭ malmultega mono. Al la eks-Guruo la sekto pagas pension. La fruktonde liaj instruoj kaj laboroj oni ĝuadas. Liajn erarojn kaj mensogojn oni flankenmetis.

Postnoto de la aŭtoro:

Mi ĵus ricevis la jenan noton de mia amiko Kurt Jung:

"Via rakonto levas dolĉacidan, amuzan memoron en mi. Mi ofte veturas al Toronto por viziti mian amikon Anthony. Unufoje, en la fruaj okdekaj jaroj, mi vizitis la vidindegan Toronto-muzeon de ceramikaj artoj. Tiame, mi estis senamikina, senamikineca. Mi estis tre konscia pri ĉi tio. Unu eksponĉambro en la muzeo prezentas ceramikajn figuraĵojn de antaŭ-Renesanca monaĥa vivo: monaĥoj skribantaj, monaĥoj vinfarantaj, monaĥoj kultivadantaj. Unu figuraĵo pentras monaĥon portantan surdorse al garbejo grandan amason da fojno. Se oni atenteme vidas ĉi-objekton, oni trovas en la fojno la kruojn de bienfraŭlino apenaŭ videblajn. Ho! Ĉi tio plenigis min kun amora frustracio! En la libera dudeka jarcento, mi malhavis tion, kion romkatolikaj monaĥoj evidente havis en la dekkvara jarcento!"



LIBRO
RICEVITA

Politika hegemonio
kaj
lingva hegemonio en
Eŭropo

Politika hegemonio kaj lingva hegemonio en Eŭropo de Andrea Chiti-Batelli kaj Pierre Janton. Tr. Umberto Broccatelli. Rotterdam: UEA, Esperanto-Dokumento-33E, 1995. 19p.

La klasikaj argumentoj pri la kulturaj kaj edukaj danĝeroj de la Angla lingvo kiel tuteŭropa lingvo. Diras resumo sur la lasta paĝo:

La angla lingvo minacanta la eŭropajn kulturojn minacas do ankaŭ tion kio plej angla estas en la kulturo, kies portanto ĝi estas en la diversaj landoj... La samnivela angla lingvo de la multnaciaj kompanioj ne zorgas pri Shakespeare aŭ pri Milton pli multe ol ĝi zorgus pri Dante aŭ pri Cervantes. Ĝi estas la perilo de la ekonomia kaj socia modelo sur kiu baziĝas la potenco de la okcidentaj burĝaroj.... Jen estas tiu angla lingvo kiu minacas la eŭropajn identecojn.

Ĉtiu broŝuro haveblas ĉe UEA, aŭ per la AEA-libroservo. Ĉar la sendkostoj multe superas la aĉetkoston, estas rekomendate mendi ĝin enkadre de aliaj mendoj. §

LIBRO
RICEVITA

La ĉapo de la
sterko-vermo

La ĉapo de la sterko-vermo, de George Kamaço. Thauriers (Francio): La kromkancerkliniko 1995. 20p. grandformataj.


Traduko de tekstoj verkitaj dum sub la influo de la drogo psilocibo en 1991.

La aŭtoro diras:

La teksto konsistas en esperantigo de la sentitola teksto skribita hispanlingve sur lernejana kajarbo, mi klare avertas: ĝi estas nek fikcia nek beletra. Se paroli senkompleze, temas ne pri rakonto, sed pri la speco de mensa lakso aŭ de vorta tenesmo. Kiu volas legi, tiu legu ĝin kiel dokumenton aŭ kiel kuriozaĵon...

Temas ne pri beletra, sed pri la dokumento aŭ atesto, kiun eble kelkaj trovos interesa el vidpunkto psika, farmacia, lingva aŭ akademianologia... Akompanas la tekston ampleksa glosaro kaj notaro klariganta nekutimajn vortojn kaj aludojn.

Havebla ĉe ĝia eldoninto. §



Igorj Elmlkov

**de Antonio Suárez Rodríguez**

Mi konstatis ke mi miskontribis
mianpoŝtan adreson [ESK 23].

Mia ĝusta adreso estas:

Antonio Suárez Rodríguez

Poŝtkesto 435

38080 Santa Cruz de Tenerife

Hispanio

Ret-adreso: asuarez@arrakis.es

En la revuo aperas Poŝtkesto
425 (!). Mi pardonpetas kaj deziras
denove mia adreso. Ankaŭ mi ne
bone klarigis ke mi eĉ preferas la
e-poŝtan korespondadon, tial mi
aldonas mian Ret-adreson.

de Sylvan Zajt

Mi multe ĝuas vian revuon kaj
mi feliĉiĝas ke mia malgranda libro
[Peter Jameson's Secret Language]
plaĉas al vi.

Parenteze, por la fama koncerto
en Berlino, Leonard Bernstein
decidis uzi "Freiheit" anstataŭ la
kutima "Freude" pro tio, ke tiam
oni festis la malaperon de la
Berlina Murego. Origine, laŭ mia
memoro, Schiller deziris uzi "Frei-
heit" sed li ne povis uzi ĝin pro

politikaj kialoj.

Dankon pro la atentigo. Mi pardonpetas al Bernstein. —
Red. de Margo Furness

La Mastro de l'Fingoj: se teda, kial?

Mi legis la unuan volumon dum flugvojaĝo al Eŭropo, kaj ĝojis ke mi povis tie aĉeti la duan por legi dum la revenvojaĝo. (Mi ne endormiĝis). Nikolá Rastić' opinias ke tiu romano estas pli bona en lia nacia lingvo ol en la Angla. Kial?

Mi konsentas kun la ESK-re-cenzisto ke la verko enhavas troegan priskribon de pejzaĝoj, kaj eĉ pli de vetero. Tion mi neniam rimarkis kiam mi legis la originalan tekston. Jen la problemo, laŭ me. Legante la denaskan lingvon, la okuloj aŭtomate pretersaltas tiajn frazojn. Kontraŭe, (almenaŭ) nespartulo legas ĉiun vorton de fremdlingva teksto; plurfoje, se la litertiparo spenaŭ distingas inter i kaj l. Se la rakonto mem estus tiom teda, kaj ĉiuj karakteroj tiom kartonecaj, kiomplendis la recenzisto, la romano ne estintus furora, nek kiel alegorio nek kiel (laŭ la intenco de la verkisto) simpla rakonto. Kaj certe, William Auld ne komencintus la amlaboron de traduki tri-voluman verkon. Tamen fuŝoj pri nomoj indikas ke li — kaj la korektisto — laciĝas (Samsaĝo / Samvajo, Piko / Pikilo, la transliterumado de Incanus). Eble iu devus konsili al S-ro Auld ke por la tria volumo li forlasu necesajn priskribojn. Kaj uzu alian presejon. ○



BERNARD GOLDEN

ESPERANTAJ

LOKNOMOJ

Lastatempe mi havis okazon re-ekzameni demandon pri kiu mi antaŭe verkis plurajn artikolojn: paronimoj en Esperanto. Laŭ PIV "paronimo" estas "vorto preskaŭ samsona kiel alia, sed sence malsama, ekz.: pesi-pezi". Sekvas jena ilustra frazo: "en Esperanto la paronimoj estas principe evitindaj, krom se iliaj sencoj estas tre malsimilaj".

Kelkaj paronimoj estis Fundamente enradikigitaj en Esperanto fare de Zamenhof mem: fronto/frunto, pohvo / puhvo, tabelo / tabulo. Aliaj estis poste oficialigitaj: kompensi/rekompenci, deserto/deszerto, pensio / pensiono. Fine, po unu membro de la sekvaj paroj ankoraŭ ne estas aprobita de la Akademio de Esperanto: damaĝi / domaĝi, oferi/oferti, rakedo/raketo. Mi havas dosieron plenan de citaĵoj montrantaj malĝustan uzon de paronimoj en publikigitaj verkoj. Lernantoj kaj uzantoj de Esperanto, senkonsidere de sia gepatra lingvo aŭ nivelo de primajstrado de Esperanto, havas malfacilaĵojn ĉiam memori kiu vortformo estas

uzenda en specifa kunteksto.

Ekzistas ankaŭ loknomaj paronimoj. Problemo estiĝas kiam ne estas diferencoj en nomformoj en etnolingvo, sed oni volas indiki la diversajn lokojn per iu rimedo en Esperanto. Bertil Wennergren pri-traktas la paron "Meksiko / Meksikio":

Aparte komplika estas la kazo de Meksiko, ĉar ni havas ne malpli ol kvin aferojn kun tiu nomo: la lando Mexico, la urbo Ciudad de Mexico, la federacia ŝtato Mexico, la golfo de Mexico kaj la Usona ŝtato New Mexico. (Planlingvistiko, 1985 aŭtuno; 4[15]:4)

Wennergren ne proponas solvon en sia artikolo, do jen mia solvo:

Meksiko	—	la lando
Meksikŝtato	—	la federacia ŝtato
Meksikurbo	—	la ĉefurbo de la lando
Meksikgolfo	—	la golfo de Meksiko
Nov-Meksiko	—	la usona ŝtato New Mexico

La Esperantigo estas tiel simpla ke eĉ eterna komencanto povas enkapigi ĝin. Rimarku, ankaŭ, kiel estas eble eviti la paroniman paron "Meksiko/Meksikio".

[el *Litona Stato*, 5/1996;
teksto multe mallongigita.] §



En Esperanto abundas paronimoj (vidu la artikolon "Pri loknomoj" de Bernard Golden sur p. ... de ĉi tiu numero). Ili ofte konfuzas kaj komencantojn kaj spertulojn. La sekvanta listo estas el la Fundamento. Ĉu vi povas identigi la diferencajn signifojn de la vortoj en ĉiu paro aŭ grupo? (Respondoj sur p.)

- (1)....bordo/borderi
- (2)....ĉif,ĉifono
- (3)....drapo/drapiri
- (4)....drinki/trinki
- (5)....efiki/efektiva
- (6)....ekster/ekstra
- (7)....fabelo/fablo
- (8)....festi/festeni
- (9)....fonto/fontano
- (10) forta/fortika
- (11) fronto/frunto
- (12) grajno/greno
- (13) ĵus/ĵusta
- (14) katuno/kotono
- (15) kero/koro
- (16) komuna/komuni

- (17) konduki/konduti
- (18) konkuri/konkurso
- (19) konscii/konscienco
- (20) korp'o/korp'uso
- (21) krimo/kriminala
- (22) kvita/kvitanci
- (23) letero/lit'ero
- (24) majstro/mastro
- (25) nep'o/nevo
- (26) nobelo/nobla
- (27) nombro/numero
- (28) ordo/ordeno/ordono
- (29) pag'o/pag'io
- (30) pesi/p'ezi
- (31) plado/pl'eto
- (32) pokvo/pudro/pukvo/puk'oro
- (33) por/pro
- (34) provi/p'ruvi
- (35) ŝargi/ŝarg'i
- (36) senco/senti
- (37) signo/signalo
- (38) soni/sonori
- (39) spirito/sp'rita
- (40) super/supra
- (41) tabelo/tablo/tabulo
- (42) tetro/tetrao
- (43) tomi/turni
- (44) triki/trikoto
- (45) universo/universala
- (46) vana/vanta
- (47) vesto/veŝto



Deziras Korespondi

Adreso de la Korespondservo de AEA: Betty Aulsebrook, 51 Lakeview Crescent, Forster NSW2428. La originaj leteroj de la ĉisube listigitaj personoj estas haveblaj ĉe tiu adreso.

Se vi deziras aperigi korespondpeton en ĉi tiu rubriko, bonvolu kontakti Betty Aulsebrook.


✍️ **FR-RO WANG** p.k.913, Sochi-centro 354000, Rusio. 32-jara mesaĝisto, interesigas pri literaturo, astrologio, kuirarto, turismo, muziko, misteraĵoj, jogo. Volas korespondi tutmonde.


✍️ **HIROKI OKI**, Saitama-ken, Urawa-si ookubo-ryouke, 99-2 Ekuseru 1-202, 338 Japanio. 35-jara. Bona komencanto, ankaŭ lernas la Anglan. Vojaĝis ĉirkaŭ N.Z. dum unu jaro. Deziras diskuti multajn temojn.

✍️ **NGHIMUYA AIRNIS I**, PO Box 175, Dowa, Malawi. 26-jara. Deziras korespondi kun pacemaj samideanoj, trovi novajn amikojn.

✍️ **KANNAS ISKO**, Oohjolanhatu 33B32, 87100 Kajaani, Finnlando. 47-jara fraŭlo. Deziras korespondi kun virinoj. Interesigas pri ĉiuj

temoj. Sendis 6 internaciajn respondkuponojn.

 KRFR ATAN, 4 Humphery St, Waverley, Launceston TAS 7250, Aŭstralio. 12-jara. Aŭstraliana skolto. Havas hundon. Deziras korespondi kun eksterlanda skolto. Ŝatas sciencojn; akvopilkon.

 Geesperantistoj el Nizhnevartovsk en Siberio volas kun vi korespondi pri ĉiuj temoj. Respondo estas garantiata. Adreso: Interklubo "Esperanto", Rusio, 626440 Nizhnevartovsk-6, Str. 60 let Oktjabrja 6-135.




Atentigas Bob Felby

Okazos Solena Malfermo por la 13-a Aŭstralia Esperanto-Somerkursaro, lundon la 13an de januaro 1997 en la Kongresejo en Norda Teraso, Adelajdo, de la 9-a ĝis la 11-a a.t.m. Espereble ni povos persvadi eminentulon veni, saluti kaj malfermi la Somerkursaron. Ĉiuj estos bonvenaj.

UK

EN JULIO

Se vi bonvolos helpi prizorgi la Infanan Kongresegon, bonvolu kontakti Barbara Bruer, RSD 226, Strathalbyn SA 5255.



KONKURSO LITERATURA

informas José Martín del Pozo
En junio de 1997 aperos la 50a numero de la revuo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo (Hispanio), la *Gazeto Andaluzia*. La respondeculoj de AEU kaj de *Gazeto Andaluzia*, opiniante ke tiu estos grava numero por revuo kiu aperas nur 4 fojojn jare, simbolante do laboron de 12 jaroj, decidis organizi unufojan literaturan konkurson, kiun regos jena Regularo:

1. Nur eblas konkursi per noveleto(j) originale en Esperanto verkita(j), ne per traduko(j) el aliaj lingvoj.

2. Ĉiu konkursant(in)o rajtas partopreni per tiom da konkursaĵoj, kiom li/ŝi volas.

3. Ĉiu konkursant(in)o devas sendi tri ekzemplerojn de la konkursaĵo, tajpitajn laŭ duoblajn interliniojn, kun la indiko "Konkurso: 50 numeroj de *Gazeto Andaluzia*". La konkursaĵo ampleksu maksimume 6 paĝojn, po 30 linioj.

4. La konkursaĵoj estu subskribitaj per pseŭdonimo por kaŝi la identecon de la konkursant(in)o. En aparta fermita koverto, surhavanta la identigan pseŭdonimon, estu slipo kun la nomo kaj adreso de la konkursanto.

5. Kune kun la Verdikto, aperos la nomoj de la juĝintoj.

6. La dat-limo (laŭ la poŝt-stampo) por sendi la konkursaĵojn estas la 31a de marto de 1997. La Verdikto publikiĝos en la 50a numero de *Gazeto Andaluĉia*, en junio de 1997. Oni diskonigos la nomon de la gajnant(in)o per aliaj gravaj revuoj esperantlingvaj.

7. Oni sendu la tekstojn al S-ro J.F. Martín, Poŝtkesto 5184, 29080 Malaga, Hispanio.

8. La premio konsistos el 10000 pesetoj.

9. *Gazeto Andaluĉia* rezervas al si la rajton publikigi la venkintan noveleton en sia numero 50, kaj en futura TTT-hejmpaĝo (en la Internet) de AEU. Ankaŭ la plej bonajn nevenkintajn verkojn oni publikigos en la revuo, laŭ aparta konsento kun la aŭtor(in)oj.

10. Ĉiun dubon pri ĉi tiu regularo solvos la juĝantaro laŭ sia bon-trovo. §



De fine en decembro 1996 sonas ĉiutage en muzikradioj de la tuta Hispanio disko en Esperanto. La verko mem nomiĝas *Esperanto*, kaj estas eldonita de WarnerMusic Spain. Ĝi lanĉiĝis internacie en januaro.

La disko konsistas el 10 kantoj tute en Esperanto, kantataj de profesiaj korusoj Bulgaraj kaj Rusaj.

La muziko estas tute sintezila, moderna adapto kaj reverko de klasikaj pecoj ne tre konataj de la ĝenerala publiko. La nura tre konata melodio estas tiu de "Odo al ĝojo" de Beethoven (kanto "La rido") La kajero enhavas la originalajn tekstojn en Esperanto kaj tradukojn en la Angla, Franca, Germana, Hispana, Itala kaj Japana. La aspekto kaj aranĝo estas tre bonkvalitaj. Kompanio: Warner Music Spain

Disko-numero: 0630-17124-2

PRAQUE MANIFESTO OF THE MOVEMENT FOR THE INTERNATIONAL LANGUAGE ESPERANTO

We, members of the worldwide movement for the promotion of Esperanto,
adressed this manifesto to all governments, international organizations and
people of good will,

declare our intention to continue working steadfastly for the aims expressed
herein

and *invite* each individual organization and person to join in our endeavours.

Launched in 1887 as a projected auxiliary language for international communication, and rapidly developed into a language full of life and rich in shades of meaning, Esperanto has already been functioning for more than a century to link people across language and cultural barriers. Meanwhile the aims of those who speak it have not lost importance and urgency. Neither worldwide use of a few national languages, nor progress in the technology of communications, nor the discovery of new methods of language teaching is likely to give effect to the following principles which we consider essential for a fair and effective language order.

1. **Democracy.** A communications system which actively gives privileges to certain people but requires of others that they invest years of effort to achieve a lower grade of capacity, is fundamentally undemocratic. Although, like all languages, Esperanto is not perfect, it is far superior to all rivals as regards equality in worldwide communication.

We assert that language inequality brings about inequality in communication at all levels, including the international level. We are a movement for democratic communication.

2. **Transnational education.** Every ethnic language is linked to a definite culture and nation or nations. For example, the school student who studies English learns about the culture, geography and policy of the English speaking countries, especially the United States and United Kingdom. The school student who studies Esperanto learns about a world without frontiers in which every country is presented as home.

We maintain that education through any ethnic language is linked to a definite perspective about the world. We are a movement for transnational education.

3. **Educational effect.** Only a small percentage of those who study a foreign language succeed in mastering it. Full command of Esperanto is possible even for the self-taught. Various research programs have reported positive effects for the learning of other languages. Esperanto is also recommended as a key component in courses to promote the language awareness of students.

We maintain that the difficulty of ethnic languages is always an obstacle for many students who would nonetheless profit from knowledge of a second language. We are a movement for effective language teaching.

4. **Multilingualism.** The Esperanto community is one of the few world-scale language communities whose speakers are without exception speakers of two or more languages. Every member of the Community has accepted the task of learning at least one foreign language to the speaking level. Frequently this has led to the knowledge and love of several languages and to a wider personal horizon.

We maintain that the users of all languages, great and small, should have a real chance to acquire a second language to a high level of communication. We are a movement which seeks to provide that chance.

5. **Language rights.** The unequal distribution of power between the languages is a recipe for constant language insecurity or direct suppression of languages, for a large part of the inhabitants of the world. In the Esperanto community native speakers of languages large and small, official and non-official, meet on neutral ground, thanks to a mutual wish to arrive at agreed solutions. Such a balance between language rights and responsibilities provides a precedent to develop and evaluate other solutions for language inequality and language conflicts.

We maintain that the tremendous power differences between languages undermines the guarantees stated in so many international documents about equal treatment without distinction as to language. We are a movement for language rights.

6. **Language diversity.** The national governments are apt to consider the great diversity of languages in the world as a barrier to communication and development. For the Esperanto community, however, language diversity is a constant and indispensable source of richness. So, each language, like each living species, is valuable on its own account and worthy of protection and support.

We maintain that the policy of communication and development, if it is not based on respect for and support of all languages, condemns to death the majority of the languages of the world. We are a movement for language diversity.

7. **Human emancipation.** Every language both liberates and imprisons its users, giving them the power to communicate among themselves while excluding communication with others. As a planned and universal means of communication Esperanto is one of the great functioning projects of human emancipation — a project to enable each human being to participate as an individual in the community of humankind, with firm roots in local cultural and language identity but not confined by them.

We maintain that the exclusive use of national languages inevitably erects barriers to free expression, communication and association. We are a movement for human emancipation.

Adopted at the Universal Congress of Esperanto, Prague, 1996

Translated by Ralph Harry
One-time Australian ambassador
to the United Nations



WORLD ESPERANTO CONGRESS
ADELAIDE, SOUTH AUSTRALIA
July 19-27, 1996

LOCATING STUDIES IN ESPERANTO AND INTERLINGUISTICS

by Humphrey Tonkin

According to a recent article in *Infornito por Interlingvistoj*, the MLA *International Bibliography of Books and Articles on the Modern Languages and Literatures* is now the most comprehensive annual bibliography of publications in Esperanto studies and planned languages generally. The chapter of the Linguistics volume (vol. 3) entitled "Auxiliary Languages. International Languages" contains, on average, some three hundred items published in Esperanto and other languages in the previous year. It results from a comprehensive survey of Esperanto periodicals conducted annually at the Hodler Library of the Universal Esperanto Association, and from the collection of information through colleagues engaged in Esperanto studies and linguistics. A general list at the beginning of the section deals with interlinguistics and customarily contains items published in six or eight languages in ten or a dozen countries. Under Esperanto a list of general works is supplemented by listings for bibliography, grammar, lexicology (in various subdivisions), morphology, onomastics, phonetics, semantics, stylistic syntax, translation, and writing systems. Such language projects as Glosa, Ido, and Interlingua also appear in the chapter.

Numerous other items dealing with Esperanto literature appear in the volumes on national literatures and general literature. Authors writing in Esperanto are normally included under the literatures of their individual countries and are cross-listed in the index. General literary criticism appears in the general literature volume. Further items on literature and linguistics that simply happened to be written in Esperanto are published in the appropriate sections of the bibliography. The CD-ROM cumulative version of the bibliography offers classified references to several thousand publications on Esperanto and interlinguistics. Both the printed version and the cumulative CD-ROM version are available in major research libraries and many members of the MLA subscribe to all or part of the printed bibliography. The bibliography is also available for online searching through OCLC and on the Internet through SilverPlatter.

The chapter editors are Humphrey Tonkin, of the University of Hartford, U.S.A., and Detlev Blanke, of Humboldt University, Germany.



Ŝajnas al mi nesage, instrui ke certa vorto en Esperanto povas esprimi du kontraŭajn signifojn (ESK 18 p 16/17). Ĉu Waringhien tiom malpravus, kiam en 1945 li skribis ke "ĉiu lingva funkcio esprimatu ĉiam per la sama elemento kaj ke tiu ĉi elemento esprimas ĉiam la saman funkcion" (G. Waringhien: *A. B. C. d'Espéranto*)?

Ni rigardu ĉu la dusenceco vere aplikiĝas al "krom".

Mi antaŭmetas, ke "krom" ĉiam signifas "plus" kaj ke "escepte de" ĉiam signifas "minus", "sen", "ne enkalkulante". Se tiu regulo ĉiam aplikiĝos, ne ekzistos kazo de escepteco, kaj la lingvo estos regula.

"Krom" estas prepozicio kaj "escepte de" estas prepoziciaĵo: ili enkondukas prepozitivon, ofte adjektan kaj malofte suplementan (same "krome/kroma" kaj "escepte/escepta" solaj).

La resto (aŭ parto de la resto) de la propozicio (verbo[j], subjekto, kaj aliaj eventualaĵoj) do apud "krom ..." indikas la aferon al kiu oni aldonas (= plus) la kromaĵon, dum apud "escepte de ..." la resto

(aŭ parto de la resto) de la propozicio indikas la aferon el de kiu oni forprenas la "esceptaĵon". Jen ekzemploj:

1. Mi dormas posttagmeze krom dum la nokto: "dum la nokto" aldoniĝas al "(mi dormas) posttagmeze".

2. Ŝi manĝis fromaĝon krom la frukto: "la frukto" aldoniĝas al "la fromaĝo", do "fromaĝo plus frukto". (t.e. gramatike, sed mense la fromaĝo aldoniĝas al la frukto).

3. Mi dormas je ĉiu posttagmezo escepte de dimanĉe: "dimanĉe" forprenatas el "ĉiu posttagmezo".

4. Ŝi manĝis la fruktojn escepte de la vinberoj: "la vinberoj" forprenatas el la fruktoj, do "fruktoj minus vinberoj".

Kie kelkaj Esperantistoj ne konscias pri tiu plus- kaj minus-regulo estas tiam, kiam troviĝas negativajo en "la resto" (= la parto ekster la kromaĵo aŭ ekster la esceptaĵo).

Tiel en "ĉie estis nenio krom akvo" temas pri nenio + akvo = akvo; en "Neniu alia vorto krom tiu konvenos" pri neniu alia vorto + tiu (vorto) = tiu vorto; en "Via teksto estas senerara krom unu frazo" = kaj via teksto kaj unu frazo estas seneraraj: sensencaĵo, ĉar devas esti "escepte de unu frazo" = la teksto minus unu frazo.

En "Miperdis ĉiujn liajn leterojn krom unu" pri ĉiuj leteroj plus unu = sensencaĵo ĉar devas esti "escepte de unu"; en "Mi iros al la urbo morgaŭ, krom se pluvos" pri

mia irado morgaŭ plus se pluvos, = sensenaĵo ĉar devas esti "escepte se pluvos" (= morgaŭ minus se pluvos = "morgaŭ se ne pluvos").

Notu ke la signifoj de "krom" kaj "escepte de" estas (kaj estu) tute klaraj, kaj ke tial nenie bezoniĝas aldoni "ankaŭ", ĉar "krom" = "ankaŭ" kaj "escepte de" = sen.

Mi ne komprenas kial imiti la kelkajn nelogikaĵojn troviĝantajn en PAG kaj la pli multajn troviĝantajn en PIV. Eble temas pri simpla (kaj simpleca?) nekritikema herodorado. Aŭ eble pri malkonscia deziro malsimpligi la lingvon por ke ĝi simulu al etna lingvo (ankaŭ Zamenhof kelkfoje faris tion!). Kio estas pli simpla kaj regula ol "plus" kaj "minus", ĉiam aplikeblaj al "krom" kaj "escepte de" (= "malkrom")?

P.S. La negativajoj en la prepozitivoj estas teorie ankaŭ eblaj: *Ŝi manĝis la frukton krom nenio* = "sen io" = frukto + nenio = frukto, kaj *Ŝi manĝis la fruktojn escepte de nenio* = "sen nenio" = "la fruktoj minus nenio" = la fruktoj.

~ ~ ~ ~ ~

Komento pri "foje" kaj similaj "mallongigitaj adverboj" (v. ESK 22 p.11):

Se la kerno de nova ĝeneralsenca adverbo estas substantivo plus prepozicio, ĉi lastan oni povas forlasi, ekz. *dimanĉo*. En ĉi tiu kazo

temas ne pri plena ĝeneraliĝo (ekz. ke oni povas imagi plurajn malsamsignifajn prepoziciojn: *je*, *post*, *antaŭ*, *ĝis dimanĉo*), sed pri konvencio inter la Esperantistaro ke oni forlasu nur certan prepozicion.

En la kazo de "dimanĉo" ĝi estas "je" aŭ "en dimanĉo". Do pro konvencio "dimanĉo" neniam povas signifi "post dimanĉo" aŭ "ĉirkaŭ dimanĉo".

Oni ofte renkontas tiajn konvenciajn adverbojn elprepozitivajn. Tiel "mane" ĉiam signifas "per la mano", neniam "en la mano". Se do la signifo postulas "en (aŭ "sur") la mano", oni devas reteni la prepozicion (enmane, surmane).

Ĉe la ankaŭa forlaso de plurindiko kaj de pronomoj adjektivaj tio kreas plurajn mallongajn prepozitivojn, kiuj estas nur adverboj. Se pronomo indikon la signifo postulas, ekz. en "je ĉiu dimanĉo", oni devas reteni la pronomon: "ĉiudimanĉo", same kiel "ĉiudimanĉe" kaj "ĉiudimanĉe" kaj "venontimanĉo". La mankanta prepozicio ĝenerale estas la plej ofte uzata. Sed kelkfoje ekestas problemeto: "foje", "tempe", "hore". Ĉu "foje" venas el "je tiu fojo" aŭ "je unu fojo" aŭ "je ĉiu fojo" aŭ eĉ "je tiuj fojoj" aŭ "je iuj fojoj" aŭ "je multaj fojoj"? En ĉi tiu kazo estas rekomendite uzi "multfoje", "unufoje", "plurfoje", "ĉiufoje", "tiufoje", "iufoje" (= preskaŭ "iam"), "ĉiufoje", kaj lasi "foje" por la signifo "iam kaj nur unu fojon", "en certa iama okazo", ktp., kiel en "Foje regis reĝo, kiu...". §



Alan Tousey

LINGVA ANGULO

PO

De nia estimata redaktoro mi ricevis pluan ekzemplon de la uzo de po. Li skribis:

“Mi legis ĉi tion en mesaĝo en la Internet. La gramatikaĵo multe interesas min. Ĉu vi bonvolos skribi iom pri ĝi en via venonta artikolo?”

‘ekde printempo ni okupiĝas pri la kompilado de la reta varianto de “Plena Kalendaro de Esperanto-aranĝoj”. La informojn ni kolektas el ĉiuj eblaj fontoj (aliĝiloj, rektaj mesaĝoj, aliaj gazetoj), kaj d’alire aktualigas la liston po 2-3 semajnoj.’

(emfazo mia)

(the writer meant ‘at two-three week intervals’)

Sur p. 24 de la lasta numero (nov.-dec. 96) de ESK, mi citis ekzemplon “posep jare — every seven years”. Tio estas nur unuvorta adverba formo de “po sep jaroj”, do la supra ekzemplo estas tute ĝusta, signifante “every two or three weeks”. Oni povus skribi ankaŭ “potrisemajne”, konforme al la ekzemplo citita de mi en la lasta numero. Alia eblaĵo por esprimi la saman ideon estas “ĉiujn du-tri

semajnojn”.

NEXT

La kutimaj tradukoj de ĉi tiu angla adjektivo troveblaj en la vortaroj estas: venonta (kiel en la frazo citita supre el la letero de D-ro Broadribb), sekvanta, sekvonta, sekva, posta; apuda, (plej) proksima. Ekzemple:

(la) venontan jaron — next year.

(la) venontan fojon — (the) next time.

en la sekvantaj/sekvontaj tagoj (laŭ la kunteksto) — in the next few days.

La postan tagon li vizitis sian amikon — The next day he visited his friend.

En la venonta numero, la apuda/plej proksima domo.

mia apuda najbaro — my next-door neighbour.

tute apude — next door (adverbo).

poste — next (adverbo).

Sed kelkfoje “sekvanta, venonta, ktp.” ŝajnas iom pezaj, aŭ ne komplete adekvataj, tial oni ofte nun vidas “neksta” (el angla next, germana nächst). Kutime mi ne aprobas tiajn neologismojn, kiam jam ekzistas taŭga vorto en nia lingvo, sed ĉi tie mi sentas ke ja estas loko en la lingvo por ĉi tiu vorto. Frazoj kiaj “en mia neksta artikolo”, “la neksta libro, kiun li intencas verki, temas pri geologio”, ŝajnas al mi neta solvo de la problemo.

Sed preskaŭ certe ne ĉiuj samopinios! Mi bonvenigos viajn komentojn.

ESPRIMOJ POR PLI FACILA
KONVERSACIO

pri mi mem — as for me; so far as
I am concerned

ankaŭ mi! — so do (did, was, will,
etc.) I! Me too!

ankaŭ mi ne! — Neither do (did,
am, was, will, etc.) I!

mi ne! — not me! Not I! I won't! I
haven't! I didn't! etc.

(Komparu: ĉu ne? = didn't you?
won't you? didn't he? haven't
they? etc.)

Tio estas la sama afero — That
comes to the same thing.

Mi kutimas fari tiel — I usually
do it that way.

Mi kutimis je tio — I'm used to
it/that.

Tio taŭgos/servos — That'll do (the
job)

Tio sufiĉos/sufiĉas! — That'll do!
(= That's enough, That'll be
enough).

Ĝi ne estas nepre necesa/ Mi ja
povas malhavi ĝin. — I can do
without it.

Li devis esti kontenta/resti sen ĝi
— He had to do without it.

Mi tre bedaŭras — I'm very sorry;
Mi treege bedaŭras — I'm ter-
ribly sorry.

Kiel malagrabla! — What a nui-
sance!

Kia honto! — What a shame!

Domage/Bedaŭrinde, ke... — It's
a pity that...

Tio ja povas esti — That may well
be (so).

Ja povas esti ke... — It may well
be that...

volenevole — willynilly, whether

you like it or not.

ĉu licas/vi permesas/estas permes-
ate ke mi fumu? — May I smoke?
Do you mind if I smoke?

ĉu licas fumi ĉi tie? — Is smoking
permitted here? Can you/one
smoke here? laŭplaĉe/laŭ via
bontrovo — as you like/wish, if
you like.

Mi ne kontraŭas (al tio) — I've
got no objection (to that).

Mi estas forte kontraŭ tio — I
strongly object (to that), I'm dead
against it.

ĉu vi/iu kontraŭas? — Any
objection(s)?

(Objeti is a neologism, used mainly
of arguments; = kontraŭ argu-
menti; (laŭ PIV) "kontraŭmetial
iu refutan argumenton aŭ mal-
facilaĵon: Al tio ni povas objeti
ke temas pri du malsamaj okaz-
oj; forbalai ĉiujn objetojn.")¹

Atentu! — Look out! (Beware!)

sin gardi kontraŭ — beware of.

pro tio/tial ke... seeing that...

Mi samopinias / konsentas — I
agree.

Mi koncedas, ke... — I agree that...
(after expressing doubt etc.; =
concede)

Mi tute konsentas kun vi ke... I
quite agree with you that...

Mi ne konsentas kun vi pri tio —
I don't agree with you on that.


¹ Rimarku ankaŭ la oficialan vort-
on *oponi*, "Esprimi opinionon kon-
traŭan al la opinio de iu alia kaj
peni ke tiu ne povu efektiviĝi la-
sian" (PIV)—db

Pro tiu fakto/Konsiderinte tiun fakton — In view of that fact... unuflanke... aliflanke... — on the one hand... on the other hand... se ne pli diri/se diri la minimumon — to say the least.
Laste sed ne malplej grave / Last-vice sed ne lastrange — Last but not least

AVIZO

En la estonteco ĉi tiu rubriko aperos nur kiam iu petos de mi klarigon priu punkto de la Esperanto-uzado, aŭ se mi mem trovos dum mia legado ion vere diskutindan. §

— — — — —



VIDBENDO

HAVEBLAS

Ekzempleroj de la vidbendo *Al Sud-Aŭstralio! Io neordinara*, preparita de Margaret Furness, vendiĝas ĉe Brendan Linnane. Adreso: 28 Redford St, Vale Park SA 5081.

LERNEJFESTO

EN

KVINSLANDO

kompilita laŭ raportoj de
KEP ENDERBY kaj
DIANNE LUKES

Vespere, dum merkredo, la 20an de novembro 1996, la Ipswich Adventist Primary School festis sian unuan jaron da Esperanto-instruado gvidata de nia ege energia samideano Karakán Kochárdy.

Karakán Kochárdy instruis Esperanton en ĉi tiu lernejo dum 1996, al ĉiuj klasoj de la unua ĝis la sepajaroj, proksimume 70 infanoj entute. Lastatmpe ankaŭ Hazel Green vizitis la lernejon ĉiusemajne, kaj uzis muzikon kun la infanoj.

Ĉeestis la feston pli ol 60 studentoj kun siaj neesperantistaj instruistoj kaj siaj akompanantaj gepatroj. Lokaj Esperantistoj ankaŭ kunvenis por aplaŭdi kaj kuraĝigi.

Lokaj eminentuloj ankaŭ estis tie, i.a. magistratanoj; Paul Pisasale, direktoro de TAFE; Wendy Prothoroe, direktoro de la Adventistaj lernejoj en Kvinslando; kaj 12 Esperantistoj el Brisbane kaj Toowoomba. Entute estis pli ol 100 ĉeestantoj. La Estro, ĉefinstruisto de la lernejo, S-ro Murray prezidis.

La kurveno komenciĝis je la sesa horo per prezentado de la gastoj. Infano Tim Sigley benis la manĝ-

aĵojn en Esperanto. La Klubo de Patrinoj preparis bonan vespermanĝon.

Poste Kep Enderby parolis pri la avantaĝoj kiujn povas gajni infanoj studante Esperanton.

(Kep komentas pri tio: "Laŭ la aranĝo oni invitis min fari paroladon, Anglalingve kompreneble. Mi estis antaŭe avertita ke inter la gepatroj de la studentoj, kvankam certe ne la studentoj mem, jam ekzistis iom da dubo pri la merito de Esperanto kiel taŭga temo instruata al iliaj infanoj. Tiun dubon mi klopodis nuligi ene de la parolado. Laŭ la aplaŭdoj, mi kredas ke mi iom sukcesis.)

La unua- kaj dua-jaraj klasoj kantis kaj deklamis poemon en Esperanto. Klasoj 3, 4, kaj 5 kantis kaj rolis du kantojn en Esperanto, kaj bone prezentis ankaŭ malgrandan teatraĵon. Klasoj 6 kaj 7 prezentis drameton de Stefan MacGill, *En la Teatro*. Ili ankaŭ kantis "Ni estas amikoj" kun agoj.

Inter la aliaj eroj estis Unu Du, Ruĝa Pomo, Kompreneble, Rulu, La Reĝo Laboras, Saluton Amiko, Ĉe Bufedo.

Dum la vespero premioj kaj atestiloj estis disdonataj. Ni aŭskultis bonegan kiron kaj Mátyás Kochárdi, filo de Karakán, ege bele kaj lerte distris nin rivelante sian klasikgitaran talenton.

Resume: bonega kaj gratulinda entrepreno de ĉiuj niaj samideanaj respondeculoj, precipe Karakán Kochárdy. §



"Prezidantoj", foto en Melburno farita de Zeng Hoyaŭ

Nekrologo

Zeng Hoyaŭ^a

verkis Jennifer Bishop

Zeng Hoyaŭ prezidanto de la Pekina Esperanto-Asocio, mortis dimanĉon la 27an de oktobro post mallonga malsano. Vizitante siajn filojn, kun sia edzino, en Melburno, dum ses monatoj, li membriĝis en Melburna Esperanto-Societo kaj estis fidela kontribuanto. Du semajnojn antaŭ sia morto S-ro Zeng ĝuis partoprenon en Esperanto-Simpozio de Esperanto Federacio de Viktorio sed malsaniĝis dum la fina piknikekskurso.

Sepdek-kvarjara, naskite en Siĉuan-provinco, S-ro Zeng esperantistiĝis en 1939 kaj multe aktivis dum sia tuta vivo, instruante Esperanton al miloj da personoj, ofte en tre malfavoraj kondiĉoj. Dum la Kontraŭjapana Rezistmilito de la Ĉina popolo li laboris

en la redakcio de Heroldo de Ĉinio kaj dank' al kontaktiĝo kun kontraŭfaŝisma batalantino Verda Majo kaj Korea Esperantista poeto Elpin li bone konis la gravan rolon de Esperanto en internacia komunikado. Krom sian laboron kiel vicestro de la Ĉina Elektra Eldonejo, li preparis la fondiĝon de Pekina Esperanto-Asocio. Tio okazis en januaro 1981, kaj S-ro Zeng fariĝis ĝiaj vicprezidanto kaj ĝenerala sekretario.

En 1993 S-ro Zeng aliĝis al la Pasporta Servo de TEJO kaj gastigis hejme naŭ esperantistojn el kvin landoj. Menciante tion, li diris "Mi faris tion kun la celo oportuni al alilandaj esperantistoj, ĉar ankaŭ ni estis varme akceptitaj de alilandaj esperantistoj. Diverslandaj esperantistoj estas intimaj amikoj kaj Esperantujo — interhelpa familio."

[Kelkaj teksteroj en la ĉisupra nekrologo estas el El Popola Ĉinio 3/1996]



Nekrologo

Bill Graham

Bill Graham mortis 87-jara. Li laboris dum pli ol dek du jaroj por Esperanto. Antaŭnelonge Bill ricevis honoran dumvivan membrecon de la Esperanto-Ligo de Okcidenta Aŭstralio. Lia domo estis dum multaj jaroj centro kie Esperantistoj renkontiĝis por studi, legi kaj paroli Esperanton. Li ankaŭ ebligis al klubanoj ĝui semajnon

en la Birdobservatorio ĉe Eyre W.A.

Nian kondolencojn al lia edzino Val kaj ĉiuj aliaj parencoj kaj amikoj.

[laŭ La Nigra Cigno nov. 1996]



Nekrologo

EILEEN FRANCES OLSEN

1925-1996

Masterton Esperanto-Klubo
per M. Henderson

Kun malĝojo ni rimarkigas al vi la forpason de nia amikino Eileen. Ŝia patro Arthur Wiltshire, bone konata Esperantisto, konatigis Esperanton al Eileen dum ŝia juneco, do ŝi entuziasme aliĝis al la Masterton Esperanto-Klubo en 1971 por pligrandigi sian scion.

Dum la jaroj Eileen multe laboris diversmaniere por la klubo. Kun sia edzo Bill, Eileen partoprenis en preskaŭ ĉiu Nov-Zelanda Kongreso kaj en kelkaj Universalaj Kongresoj, Pacifikaj Kongresoj. Ili ambaŭ ĝuis uzi Esperanton dum la vojaĝoj, por paroli kun la korespondamikoj kaj la aliaj homoj kiujn ili renkontis.

Eileen estis fakdelegito de UEA dum kelkaj jaroj kaj ĝuis gastigi Esperantistojn el aliaj landoj.

Krom ŝian amikecon, nia malgranda klubo sentas la mankon de la fidelaj kontribuoj kiujn Eileen volonte donis.

RALPH HARRY
RE DUO BLIGADO
(Dar ŭigo kaj fino)

Konkludo

Estas evidente ke Esperanto estas vivanta lingvo. Kvankam ĝia verkinto, Zamenhof, uzis reduobligon ĉar ĝi estas universala fenomeno, la Esperantistoj tute nature uzis kaj uzas ĝin por la kutimaj celoj kaj en la kutimaj formoj. Estus interese analizi la diferencojn inter ekzemple plenplena kaj plenega. Oni ne povus diri lastega aŭ tujega, ĉu? Mi esperas ke iu daŭrigos mian kolektadon, kaj super ĉio ke niaj vortaroj inkluzivos du obligajn formojn, kun klarigo. Estus interese-interese, aŭ ĉu mi prefere diru interesege?

Bonan reduobligadon!

Aneksoj

A. Reduobligado en la lingvoj de Aŭstraliaj Aborigenoj

Estas evidente ke, same kiel en aliaj lingvoj, la lingvoj de la Aŭstraliaj Aborigenoj uzas duoblajn vortojn aŭ reduobligadon kiel lingvan metodon por diversaj celoj aŭ kun diversaj signifoj. Duobligitaj nomoj de lokoj estas oftaj, ekzemple Wagga Wagga, Mitta Mitta. Estas triboj kun la nomoj Ponga Ponga kaj Mulluk-Mulluk.

La antropologo Basedow menciis maljunan ŝamanon kun la nomo Kai Kai. Individuaj vortoj entenas reduobligon, ekzemple parapara (nardo). Estas multaj duoblaj

vortoj ekzemple kau kau (maĉita osto), langa langa (tranĉilo el konkro), wagal wagal (tjuringa, aborigena totema aĵo).

Kelkfoje la reduobligo ŝajnas onomatopea, kiam estas ripetata sono, ekzemple bbbab-ban-balele (bell-bird, sonorilbirdo), koregoore (bubuka strigo) kaj kurrek-tar-tar (svanelo) aŭ ding-ding (lokuŝto).

Kelkfoje la reduobligado ŝajnas esti speco de pluralo (komparu la Indoneziajn, Malajajn pluralformojn) ekzemple epi-epi (mamoj, la vorto por la laktarbusto ĉar ĝi elŝvitas laktosimilan sukon) kaj arre arre (temedo, kanguruh erbo).

Simile, kun la numeraloj oni trovas por kvar (du duoj) kwiarra kwiarra (lingvo de la aborigenoj de la Reĝa Golfo) kaj mandru mandru (lingvo de la aborigenoj en la regiono de Lago Eyre.

Laŭ Basedow (The Australian Aboriginal, p. 400):

diminutiva signifo estas ankaŭ donata per duobligo de origina vorto. En la dialekto de orienta Aluridja "kaltji" signifas normalan lancon, dum "Kaltji-kaltji" estas esprimo aplikata al ludil-lancon. La tribo Dieri apudskas Piejsupran Estajon kiun ili nomas "Mura", kiu ajn el iliaj duondioj, tamen, el kiuj ili spuras sian genealogion, estas nomata "Mura-Mura". Alia speco de duobligo kiel diminutiva estas nga-nga (papa, paĵo aŭ mama, paŝjo).

multaj lingvoj.

Mi menciis ankaŭ la vortojn mia-mia (kabano) kaj la arbon lilypilly aŭ lilli pilli.

Aub Podlich, en sia libro *Beyond the Trees: Meditations on the Environment* p.78 citas la vortojn de indiĝena gvidistino ĉe Uluru :

"Vi scias kiel ni nomas ilin?" (Ŝi indikis la turistojn, centojn da etataj korpoj kurkurantaĵ, kelkaj supren, aliaj malsupren) "Ni nomas ilin *māngā*, vi scias, formikoj. Ne nur formikoj sed *māngā rarra* —francaj formikoj. Kelkfoje ni diras "Tuj blankulaĵ ili *māngā rarra rarra* — *nera* francaj formikoj!"

B. La Franca stilo de reduobli-igo

En la Franca ni trovas ripeton de unusilabaj fonemoj por infaneca, junula aŭ slanga efekto:

bobo, caca, dada, pipi, baba,

Aŭ por doni la efikon de ripeta movo:

pousse-pousse, cache-cache, passe-passe

Aŭ de sono:

teuf-teuf, frou-frou, cri-cri, cou-cou.

Kelkfoje la parvortoj estas pruntitaĵ:

agar-agar, aye-aye, couscous, bébé, bérubér

Kelkfoje ili estas indiĝenaj:

bon-bon, coud-coud, chou-chou, can-can, dare-dare.

Kelkfoje estas ŝanĝo en la unua konsonanto:

pâte-mâte, char-vari, brise-brise, pom-pom.

Kelkfoje ni trovas parojn kun ligvorto aŭ ŝanĝo de vokalo:

bric-a-brac, tic-tac, tin-touin, dandin, trallala

Interesaj dusilabaj paroj kun ŝanĝo de vokalo estas:

bredl-breda, clopin-clopant.

C. La Germana stilo de reduobliga do

En la Germana ni trovas simplan ripeton de la sama fonemo:

Tamtam, Mama, Lala

Tamen ofte estas ŝanĝo de vokalo en la dua parto:

Klapp Klapp, Mischmasch, Ticktack, Zick-zack, Krabs Krabs, Schlick-Schnack

Alia variaĵo estas ŝanĝo de la dua konsonanto:

Kunt(er)kunt, Kuddelknuddel, Kak(er)kak, Hoppel-poppel

Notu en kelkaj ekzemploj la ligan silabon.

La rimantaĵaj vortoj povas esti eĉ pli longe apartigitaj:

Das Weiben und Breiten etwas erzählen

unter Dach und Fach zu bringen

ausser Rand und Rand

Flie mit Welle

Echledlich und friedlich

auf Schritt und Tritt

Leide und Meide

Im Dunkeln ist gut Munkeln (Ni eniras la kategorian proverbojn)

Mit Geduld und Spucke sangt Man eine Mucke

Von Rasse und Klasse

Lihen und Drilien
 Im Sans und Frans leben
 In Hölle und Pölle
 mit Rat und Tat zur Selts gestanden
 recht und schlecht
 aus Handel und Wandel
 Schalten und walten
 Kunt(er)kunt
 Kak(er)lak

D. Kelkaj Anglaj reduobligoj

Angle bangla Argumenti aserti
 Arty crafty arteca metla
 Bigwig eminentulo
 Boo-hoo brua plori
 Bow-wow hundiĉo
 Box and Cox Unue vi! Ne, unue vi!
 Bric-a-brac Brokantaĵo
 Belah belay Laboru, maristoj!
 Blah blah demumcatlato
 Blah blah paroladaĉo
 Booboo erareto
 Busy body enmikst/genulo
 Busy Lizzy Okrupita Oktanjo
 Dilly dally prokrasti-pasumi
 Ding-dong sensorsonoro
 Eager beaver fervora kastoro
 Fiddle-faddle pedantbagatelo
 Flip-flop strandaandalo
 Fuddyduddy fuŝoldulo
 Gogg(mobile) [nomo de marko de
 aŭtomobilo]
 Hear! Hear! Brave! Brave!
 Hell's bells! infaro kaj diablo!
 Helter-skelter konfuzo-senordo
 Higgledy-piggledy konfuzo-senordo
 Hitch-hike perveturi
 Hither and thither tien—ĉi tien
 Hock-potch milkopoto
 Hubba-bubba bonegbonaĝo
 Hubble bubble obel nargileo
 Hubbub (konfuzo) brubruo

Hurdy-gurdy turno-gardo
 Hurly-burly tumulto-puŝado
 Hush-hush sekretesekreta
 Knick-knack bagatelaĵo—juveleto
 —breloko
 Lulu boneg(a)ŝulo
 Mickle muckle malmulta, multa
 Mfish-mash mismikseĵo
 Mumbo-jumbo superstiĉaĵo, firitaro
 Mu-mu, muu muu malstrikta robo
 Namby-pamby afekta-beleta
 Nid-nod
 Nickle-nickle
 Nitty-gritty centrokerno
 Pingpong pingpong, tablotendo
 Pitter-patter sursurpaŝado
 Puff-puff lokomotiveto
 Putt-putt motorbiciklito [ankaraĵo speco
 de malmatura golfuso]
 Razzle-dazzle brill-pompo
 Riff-raff kamaĵaro
 Roly-poly rulpuŝiligo
 Silly-shally ŝanceli(a)ŝan(a)
 Silly Billy Francea Freĉo [malza(a)ŝulo]
 Tick-tack/tock tiktakl
 Tittle-tattle kalumni-klafi
 Tum-tum stomak(et)o
 Yo-yo bobenludilo, joĵoludo

[Vera Payne komentis: plej intere-
 resa estas la Indonezia reduobligo
laki-laki = viro!]

RESPONDOJ
POR
"PROVU
VIAN
VORTOSCION"

- (1) ... bordo = edge, shore
borderi = to hem
- (2) ... ĉifi = to crumple (tr. verb)
ĉifono = a rag; a shred
- (3) ... drapo = woollen cloth
drapiri = to drape
- (4) ... drinki = to drink alcohol
trinki = to drink
- (5) ... efiki = to effect, to have an effect
efektiva = actual
- (6) ... ekster = outside of
ekstra = extra
- (7) ... fabelo = fairytale
fablo = fable
- (8) ... festi = to celebrate
festeni = to feast
- (9) ... fonto = a spring; source
fontano = a fountain
- (10) .. forta = strong
fortika = robust, sturdy
- (11) .. fronto = front
frunto = forehead
- (12) .. grajno = a grain (a seed)
greno = grain (e.g. wheat, ye, etc.)
- (13) .. ĵus = just (only a moment ago)
ĝusta = correct
justa = just (righteous)
- (14) .. katuno = cotton cloth
kotono = cotton (plant)
- (15) .. kero = a heart (in card games)
koro = a heart (physical organ)
- (16) .. komuna = communal, common
komunii = to give communion (religious term)
- (17) .. konduki = to lead
kondukti = to behave
- (18) .. konkuri = to compete
konkurso = a contest
- (19) .. konscii = to be aware
konscienco = a conscience
- (20) .. korpo = a body
korpuso = a corps
- (21) .. krimo = a crime
kriminala = relating to criminal law
- (22) .. kvita = suits, out of debt
kvitanci = to give a receipt
- (23) .. letero = a letter (written paper)
litero = a letter of the alphabet
- (24) .. majstro = a master-craftsman)
mastro = a master, owner
- (25) .. nepo = grandson
nevo = - nephew
- (26) .. nobelo = a nobleman
nobla = noble, highly moral
- (27) .. nombro = a number (1, 2, 3 etc.); quantity
numero = a number (page number, house number, etc.); issue (of a magazine)
(Ŝajnas, laŭ PIV, ke ĉi tiuj du vortoj estas parte sinonimoj.)

[Vera Payne komentas: plej interesa estas la Indonezia reduobligo *laki-laki* = viro!] q

RESPONDOJ
POR
"PROVU
VIAN
VORTOSCION"

- (1)....bordo = edge, shore
borderi = to hem
- (2)....ĉifi = to crumple (tr. verb)
ĉifono = a rag; a shred
- (3)....drapo = woollen cloth
drapiri = to drape
- (4)....drinki = to drink alcohol
trinki = to drink
- (5)....efiki = to effect, to have an effect
efektiva = actual
- (6)....ekster = outside of
ekstra = extra
- (7)....fabelo = fairy tale
fablo = fable
- (8)....festi = to celebrate
festeni = to feast
- (9)....fonto = a spring; source
fontano = a fountain
- (10)...forta = strong
fortika = robust, sturdy
- (11)...fronto = front
frunto = forehead
- (12)...grajno = a grain (a seed)
greno = grain (e.g. wheat, ye, etc.)
- (13)...ĵus = just (only a moment ago)
- ĝusta = correct
- justa = just (righteous)
- (14)...katuno = cotton cloth
kotono = cotton (plant)
- (15)...kero = a heart (in card games)
koro = a heart (physical organ)
- (16)...komuna = communal, common
komunii = to give communion (religious term)
- (17)...konduki = to lead
kondukti = to behave
- (18)...konkuri = to compete
konkurso = a contest
- (19)...konscii = to be aware
konscienco = a conscience
- (20)...korpo = a body
korpuso = a corps
- (21)...krimo = a crime
kriminala = relating to criminal law
- (22)...kvita = quits, out of debt
kvitanci = to give a receipt
- (23)...letero = a letter (written paper)
litero = a letter of the alphabet
- (24)...majstro = a master-craftsman
mastro = a master, owner
- (25)...nepo = grandson
nevo = nephew
- (26)...nobelo = a nobleman
nobla = noble, highly moral
- (27)...nombro = a number (1, 2, 3 etc.); quantity
numero = a number (page number, house number, etc.); issue (of a magazine)

Lindato por artikoloj por la marta numero: 16 februaro.

Esperanto sub la Suda Kruco estas legebla per la Internet. Adreso:

<http://www.emedia.com.au/~user-s/peterb/esk/>

LA AŬSTRALIA KAJ
LA NOV-ZELANDA
ESPERANTO-
ASOCIOJ

**La Aŭstralia Esperanto-
Asocio:**

143 Lawson St, Redfern NSW 2016

Prezidanto: Kep Enderby, 2 Phoebe St, Balmain NSW 2014.

Sekretario: Alan Turvey, 143 Lawson St, Redfern NSW 2016

Kasisto: Margaret Inglis, 4 Mayfield Drive, Mt Waverley Vic 3149.

**La Nov-Zelanda Esperanto-
Asocio:**

PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035.

Prezidanto: David Rockell, 5-71 Princes St, Otahuhu, Auckland 1006. ☎ 09-270 3669.

Sekretario: Brad McDonald, PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035. ☎ kaj faksoj: 09-579 4767.

Kasisto: Jackie Fox, PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035.

KOTIZOJ:

Aŭstralia Esperanto-Asocio:

AŬD \$30 por individuo aŭ klubo (+\$5 por familiano(j) ĉe la sama adreso); \$20 por studento aŭ pensiulo; asocia membreco: \$10. Bonvolu sendi vian kotizon al Libroservo de AEA, PO Box 230, Matraville NSW 2036.

Nov-Zelanda Esperanto-Asocio: NZ\$40 por individuo, \$50 por geedza paro, \$10 por studento aŭ junulo (<20-jara). Klubo: \$1 por ĉiu ano. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto: Jackie Fox, PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035.

Unuopaj ekzempleroj de *Esperanto sub la Suda Kruco*: Por membroj, AŬ\$3 + poŝtsendkosto; por nemembroj, \$4.25 + poŝtsendkosto. Mendu de la Libroservo de AEA.

Abonoj ekster Aŭstralazio: En Usono kaj Kanado: US\$30. Mendu ĉe ELNA. Aliaj landoj: 50 Ned. Gld., pagu al la konto aeal-wde la Libroservo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio ĉe UEA. Oni ankaŭ povas pagi 34 IRK. rekte al la Libroservo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio.

Artikoloj de aŭtoroj nomitaj estas ©1997 de la respektivaj aŭtoroj. Ĉio alia en ĉi tiu numero de *Esperanto sub la Suda Kruco* estas ©1997 de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj. Represo de enhavaĵo estas permesata, kondiĉe ke la fonto estas nomita; escepte de la artikolo de Sykvan Zajt, represebla nur laŭ skribita interkonsento kun la aŭtoro.